
Feliĉajn somerferiojn!

# ANTAŬEN


Julio – 2004 – N-ro 32-a
ASTURIO

ENHAVO

2...Nia Regiono
3...La Piragfesto (2)
4...Mozaiko
5...Pensoj al Aero
6... La Plenplena Flakono
7... Mesaĝoj
8-9 Rubaĵoj
10..Lingvistiko
11..Glorkanto al Esperanto
12..Iom pri Astronomio
13..La Infano de la Ĉasisto
14..Kataj Travivaĵoj
15..Amuzaĵoj
16..Pensoj




## REVUO DE LA AVILESA ESPERANTO - GRUPO



Kaverno Pindal

Estraro de ANTAŬEN

Honora Prezidanto: **Nicolas Muñiz**

Prezidanto: **Cezaro García**
Sekretariino: **Mª Luísa Menendez**
Direktado kaj Desegno
revuo Antaŭen: **Císimo Rabanedo**
Kasisto: **Luis González**
Bibliotekistino: **Mª Isabel Murillo**

Gekomitatanoj:

**Mª José Álvarez Faedo**
**Valentín Pérez**
**Eva González**
**Gene Álvarez**
**Tere Rodriguez**
**Daise Murillo**

---


Nia adreso

Llaranes Po·tokesto 51 (CP 33460)
AVILES Asturias
Tfn 98 554 11 27
esperanto@asturies.org



Deposito legal:
Nº AS 1398 (9)
N.I.F. 33677378
Subvenciita de la Registaro
de la Avilesa Municipo


# NIA REGIONO
## Kavernoj (1)

Estis en 1908 kiam okazis la unua malkovro de paleolitika surroka arto en la nuntempa teritorio de Asturio. En aprilo de tiu jaro H. Alcalde del Río, instruisto en la Lernejo pri Artoj kaj Metioj de Torrelavega lokalizis dum la eksplorado de diversaj kavernoj de la orientaj municipoj de Asturio iujn bestobildojn gravuritaj kaj pentritaj en la kaverno El Pindal, sur la marborda klifo, je paro da kilometroj de la vilaĝo Pimiangu (municipo Ribadedeva). En la tagoj sekvantaj al la unua trovaĵo aliĝis tiuj de la kavernoj Mazaculos, proksime de La Franca kaj El Quintanal, ĉi tiu lasta en Posada de Llanes. Malmultaj monatoj poste, nun akompanata de H. Breuil (juna normanda pastro, tiam jam agnoskita kiel aŭtoritato pri paleolitika arkeologio) kaj la geologisto M. Mengaud, aliras al la interno de la kaverno La Loja, riverborde de la Deva, je la limo kun Kantabrio, trovante grandan frison da bovuloj gravuritaj sur la nigrigita surfaco de muro.

Ekde 1908 ĝis hodiaŭ kreskadis la aro da lokoj kie la arto realigita de la artistoj de la supera paleolitiko antaŭ pluraj jarmiloj. Nuntempe estas jam tridek ses la kavernoj kun paleolitika surroka arto disvastigitaj inter la riveroj Cares kaj Deva.

*La Redakcio*

## La pirogfesto (DAŬRIGO)

Dum la pirogkurado multaj homoj iras en la 'river-trajnon'. Ekzistas fervojo kiu kuras paralele al la rivero. Tiun tagon la trajno portas rigardantojn. La trajno haltas; tiam la rigardantoj kuras ĝis la riverbordo por vidi pasi pirogistojn; poste ili kuras denove al la trajno ĝis la venonta haltejo.

Sabato vespere kaj nokte la festo estas en Ribadesella, loko kie finiĝas la kurado.



Ĉi tiu imago montras la riveron Sella. Sur la ponto staras la autoritatoj kaj la invititoj. Tie oni legas disvokon (antaŭe estis Dionisio de la Huerta kiu legis ĝin. Nuntempe, ĝi estas legata de invitata homo).
Poste ĉiuj homoj kantas "Asturias patria querida" ("Asturio patrujo amata", la astura himno) kaj komencas la kurado.

La pirogistoj (la lasta jaro 1.300 el 28 landoj) estas lokataj lote, unu apud la alia. La pirogoj (la lasta jaro 980) estas sur la riberbordo. Kiam finiĝas la kantado la pirogistoj piedkuras ĝis siaj pirogoj.

Ĉi tiu estas la plej emociplena momento.

Viro kaj virinoj, gejunuloj kaj gemaljunuloj, malsuprenigas la 17 km el Sella rivero ĝis Ribadesella, kie estas la finkurado.

Kiam ili atingas al la Ribadesella ponto, la pirogkurado finiĝas.

La premio estas ne granda mone, sed la nomo de la venkulo, gravurotos en la monolito de la famo, kiu staras en Ribadesella, kaj en la koro de multaj uloj.

Se vi volas scii multe pli pri ĝi, vi povas vidi ĉe la suba ret-paĝojn:

www.descensodelsella.com/ :Estas la oficiala ret-paĝo.

www.ribadesella.las.es/descenso/ En ĝi vi povas vidi lastan pirogkuradon

Ĝis la...!

**Kristoforo**

# MOZAIKO

**SUNA MINCIGO**

Suno perdas 4.500.000 tunojn da maso po sekundo

**KIA LUMO!**

Fulmo povas produkti 3.800 milionojn da kilovatoj de elektra energio.

**VENTRO SEN SUSPENSO**

Alfred Hitchcok ne havis umbilikon; ĉi tiun oni eliminis al li post kirurgia operacio.

**FETA ELPELO**

Je la 600 a. K. Numa Pompilio, reĝo de Romo, malpermesis enterigi virinojn kiuj mortis dumgravede sen antaŭe ekstrakti la feton el ilia ventro.

**TIALE DE LA TESTIKO**

Manke de biblio, romianoj ĵuris diri veron kunpremante siajn testikojn per la dekstra mano. El ĉi tiu romia kutimo devenas la vorto "atesti".

**OVO KAJ ALIES FLAVO**

Antaŭ 300 jaroj egiptoj turniĝis en fakuloj pri ov-kovado. La produktado de kokidetoj estis tiel granda ke ili donis dek tri po dekduo.

**PLEJEBLA FRAKASO**

Por redukti pezon la unuaj bicikloj malhavis postan bremson. Tio ĉi kaŭzis terurajn akcidentojn, ĉar homoj ofte perdis la kontrolon de la bicikloj sur la tre krutaj deklivoj.

Daise Murillo

# PENSOJ AL AERO

### MENSO

Menso estas flughava poemo
kiu daŭre oferas sian amon,
konservas nin nuntempe emociitaj
kaj redonas al ni tion travivitan en estinteco.
Ĝia ĉeesto iluminas niajn vivojn,
kaj per ĝi ni ridetas dorlotataj.
Mi amas mian penson ĉar ĝi pensigas al mi.


### INOCENTECO

Inocenteco: la rideto de infano
reflektas la emocion de cia pureco,
via inocenteco ĉiam emocia
kaj via brilo
estas fontoj de interna lumo.
Per ciaj ĥimeraj sonĝoj, benita inocenteco!,
vi dormigas al ni ravitaj
en eterna printempo.
Mi amas mian inocentecon ĉar ĝi pensigas al mi

### ESPERO

Espero, fidela amiko
kiu brakume nin tenas
de cia bonfara ĉarmo,
en paco vi estas dolĉeco,
niaj estas viaj sonĝoj
kaj nia estas via amo.

Kiam nubo nigrigas nian estaĵon
vi disfaldas vian mantelon
kaj kovras nian doloron
kvazaŭ eterna bonfara feino
kiu pliigas sian splendon.
Mi amas esperon, mian amikon,
pro ŝi mi estas kie mi estas.



Verkis kaj esperantigis: Mª Luisa Menéndez

# LA PLENPLENA FLAKONO

Instruisto pri etiko alportas al sia lernantaro diversajn objektojn kaj metas ilin sur sia skrib-tablo. Kiam li komencas sian lecionon li prenas grandan kaj larĝabuŝan flakonon kaj li ekplenigas ĝin per kelkaj mezgrandaj ŝtonoj.

Tiam li demandas al siaj studentoj ĉu la flakono aspektas plena. Ĉiuj diras ke ja. Tiam la instruisto prenas saketon kun mezgrandaj plumberoj, li malplenigas ĝin en la flakono kaj skuante iom post iom la plumberoj plenigas la malplenajn spacojn inter la ŝtonoj.

Li denove demandas ĉu la flankono aspektas plena. Ĉiuj respondas, ridante, ke nun ja.



La instruisto prenas nun saketon kun sablo kaj plenigas ĝin en la flakono dum li skuas malmulte.

–Nu –diras la instruisto– mi volas ke vi komprenu ke ĉi tio estas kiel viaj vivadoj. La grandaj ŝtonoj estas la gravaj aĵoj: viaj familioj, viaj geamikoj, via sano, aĵoj kiuj, post kiam ĉio alia perdiĝos ankoraŭ plenigos viajn vivadojn. La plumberoj reprezentas aĵojn kiuj gravas iom malpli, kiel via laboro, via domo, via aŭtomobilo. Kaj la sablo estas ĉio cetera, la senvaloraj aĵoj en viaj vivadoj.

Se vi plenigas la flakonon antaŭe per la sablo, ne estos spaco por la ŝtonoj kaj la plumberoj. Same okazas kun viaj vivadoj. Se vi volas fordormi tempon kaj energion kun sensignifaĵoj neniam restos spaco por tiuj aĵoj kiuj vere devas gravi al vi.

Okupiĝu unue pri la ŝtonoj kaj la plumberoj, tio kio plej gravas. Starigu prioritatojn, la restaĵo estos pura sablo.

Ludoviko

# MESAĜOJ

Eble ĉijare iuj el nia grupo iros partopreni en la 63-a Hispana Esperanto-Kongreso kaj 6-a Europa-Unia E-Kongreso okazonta en Bilbao, urbo situanta norde, en Eŭskio, la Baska Lando.


Dum la 4-a kaj 5-a de septembro okazos en Monistrol de Montserrat, Barcelono, Hispanio, la 3-AJ SOMERAJ DIALOGOJ Esperanto-RESTADEJO. La koresponda adreso por ĉi tiu evento estas: Salvador Aragaj, Cami del Pou 9, ES-08691, Monistrol de Montserrat, Hispanio. Tel: 64 54 04 755.

En la pasinta majo, loka televidkanalo, Popular TV, invitis la prezidanton de nia grupo, Cesáreo García, paroli pri Esperanto en debato kun la temo "Minoritatoj nuntempe". En ĝi li defendis la taŭgecon de la internacia lingvo por la respekto, konservado kaj diskonigo de etnaj kaj lingvaj kulturoj.

Nekrologo:

Ĉiuj anoj de Antaŭen sentas veran kondolencon pro la forpaso de nia tre bona amiko kaj samideano Julio. Lia edzino, Maribel, estas nuntempa bibliotekistino de nia grupo.
Ni deziras ke li ripozu pace.

**Rememoru ke vi povas kontakti nin retpoŝtante ĉi tien:** esperanto@asturies.org

INTERRETO 



# RUBAĴO

Ni estas tio kion ni manĝas. Tutcerte multaj aŭdis el la buŝo de la fakuloj pri nutrado, ĉi tiun maksimon kiu rilatigas nian sanan kaj fizikan farton direkte al niaj nutro-kutimoj. Sufiĉas esti observema kaj atenti la enhavon de la bazar-korbo de iu ajn dika homo, aŭ simple kun superpezo, por certigi la menciitan aserton. Dum en la riĉaj landoj la kadenco de vivado, la streso, la troa konsumo igas siajn loĝantojn avidaj konsumantoj de grasoj kondimentitaj de sukera eksceso, kio damaĝas kurta-tempe la vivokvaliton (kolesterolo, morbida obezo, kardiopatio, avitaminozo...) en la resto de la planedo la problemo fontas el la kontraŭa punkto: malsato. Miljonoj da homoj mortas pro subnutrado ne vivante unuapersone la polemikon kiun kreas al la konsumanto la devon decidi inter la multaj kukoj kiujn oferas la tiel saturita bretaro de la supermarkto.




En ĉi tiu panoramo de malekvaleco oni ofte aŭdas pri solvintenco por ambaŭ sociaj epidemioj (avideco kaj paŭpereco). Kie ĉio troas ĉio pruviĝas pli facila, kaj la rekomendoj de la MSO (Monda Sano-Organizacio) sekvas la logikan direkton de la modero: manĝi malpli da nutraĵoj, redukti la ingeston da graso, konsumi prefere fruktojn kaj vegetalojn... Sed, kiajn solvojn serĉi por tiuj kiuj ne povas elekti? Por ilustrado sufiĉu la ekzemplon de Brasilo; unu el la promesoj de la nuntempa prezidanto, Lula da Silva, konsistis en atingi la "plenan matenmanĝon" en sia lando.

Tiom da pensantaj mensoj ne povis resti pigraj (ĝi kostas monon) kaj bazitaj sur sciencaj progresoj; ili ne malfrue trovis la solvon pere de la GMO (genetike modifitaj organismoj). La genetika inĝenierio aplikata al la nutraĵ-produktado estas prezentata de la kompanioj kiuj ĝin produktas kvazaŭ sola ebla alternativo fronte al la monda trologateco (ni havas ĉirkaŭ ok cent miljonojn da subnutrataj homoj). Por la neinicito pri ĉi tiu objekto povus ŝajni realigebla kaj eĉ konsilinda ke la grandaj plur-naciaj entreprenoj provizu la merkatojn de evoluantaj landoj per modifitaj semeroj kiuj havigu al tiuj ŝtatoj bonan produktadon kurta-tempe (la genetike modifitaj semeroj povas esti

rezistemaj al pesticidoj, daŭras pli da tempo stokitaj, duobligas la grandecon de siaj fruktoj, povas produkti kelkajn rikoltojn po jaro...) Sed ĉi ĉiuj "profitoj"... je kioma prezo?

Nur dirante ke ankoraŭ oni eksperimentis sufiĉe por scii kiajn efektojn ĝi havos longa-tempe en nia organismo la ingesto de tiel maltro naturaj nutraĵoj devus sufiĉi por rejekti la enkondukon de transgenikoj en nutrado.

Kvankam la danĝereco de ĉi tiu afero estas ankoraŭ pli granda: ni permezas pasive al la plurnaciaj entreprenoj infekti per semeroj rezistemaj al ĉiaj antibiotikoj kaj pesticidoj, ĉefaj kaŭzantoj de la malapero de kancerogenaj tumoroj. Kiam kamparano estas trudata uzi transgenetikajn semerojn oni efektivigas poluon pere de la poleno de ĉi tiu vario, kaj ĉi tio afektas la aŭtoktonajn variojn. Neniu povas eviti ke insektoj portu manipulitan materialon, same por birdoj kaj vento, kaj ankaŭ por besto kiu ĝin konsumos pasante poste al alies organismo konsekvence de la nutro-ĉeno.



La plurnaciaj entreprenoj kiu agas kun ĉi tiu tipo da varo estas la ununuraj kiuj havas rajtigon por ĝin vendi, senigante la kamparanon de la necedebla rajto vendi, planti aŭ konsumi siavole la plusoj de la rikoltoj kiel ĝis nun okazis. La disvolviĝinta mondo ankoraŭ konservas la kapablon sin defendi. Kreskante multenombraj grupoj postulas informadon al produktantoj kaj fabrikistoj, timantaj la eblecon ingesti GMO kun la risko por sano kaj natura medio kiu el tio povus aperi. La alia mondo, tiel riĉa en biodiverseco, ĉeestas, kun ligitaj manoj, la detruon de siaj tradiciaj kultivaĵoj (ekz. centoj da varioj da rico atingitaj miljare pere de krucadoj kaj hibridigadoj de sovaĝaj lokaj specoj estas malaperintaj por ĉiam), kaj suferas, laŭ sia elteno, novan klason de ekspluatado kiu intencas, enŝuldigante ilin ege ankoraŭ pli, igi ilin rubaĵo. Ni estas tio kion ni manĝas.



TERESA RODRÍGUEZ


Nlaj Geamikoj:

# LINGVISTIKO

Mi deziras, ke vi komprenu, ke lingvistiko estas scienco inter multaj aliaj sciencoj. Lingvistiko estas mia fako. Oni do prave povas diri, ke mi estas fakulo pri lingvistiko. Lingvistiko estas mia specialaĵo, se vi volas.

Sed la fako, ke mi lernis multe pri lingvoj kaj pri lingvistiko, la fakto, ke mi estis studento pri tiu fako, ne permesas al vi diri, ke mi scias multe pri la aliaj sciencoj. Multaj sciencaj aferoj estas por mi misteraj, en fakoj, kiuj ne estas la mia.

Nu, ni ne parolu pri tio. Ni ne parolu pri tiuj aliaj sciencoj. Ni parolu nur pri mia fako, nome lingvistiko. Lingvistiko estas la scienco pri lingvo. Pri lingvoj, se vi preferas. Lingvistiko, t.e. (= tio estas) lingvoscienco... jes, oni povas diri ankaŭ «lingvoscienco»..., estas la scienco pri tio, kiel ni esprimas nin lingve. Mi demandas kaj vi respondas. Kiel? Ĉu mane? Ne. Ni ne demandas kaj respondas mane. Por demandi kaj respondi, ne niaj manoj agas, ni tute ne agas fakte, ni parolas.




Eble oni povas diri, ke paroli jam estas agi. Ke parolo estas ago. Sed tamen, se oni povas konsideri, ke paroli estas agi, parolo tamen ne estas mana ago, parolo estas lingva ago.

Kiam do ni demandas kaj respondas, ni parolas, t.e. ni agas lingve. Kiam ni komunikas parole, ni relatas lingve inter ni. Nia interrelato estas lingva. Niaj komunikoj estas lingvaj. Lingvo ekzistas por komuniki, por ke ni rilatu inter ni, por ke ni povu diri al aliulo, kio okazas, kio okazis, ĉu ni konsentas kun li, ĉu ni ne konsentas, ĉu ni deziras, ke li agu por ni. Lingvo ekzistas por lerni kaj por instrui. Se ideo venas al vi, eble vi deziras ĝin komuniki. Nu, por tio lingvo ekzistas. Por tio multaj lingvoj ekzistas. Por tio ni lernas ilin. Por rilati inter ni, ne nur mane, sed ankaŭ parole.

**El la libro "Lasu min, paroli plu"**

Aŭtoro: Claude Piron


# GLORKANTO AL ESPERANTO

Ho, mia kara lingvo Esperanto,
miraklo vera kaj neripetebla,
ŝlosil´ magia, kiu malfermadas
de ĉiuj landoj, kontinentoj pordojn,
kaj same-de la bonaj homoj korojn.

Vi, mia amo, mia vivo kaj konsolo,
multfoje savis min de malespero
dum krudaj, tristaj, dolorigaj horoj,
kiam mi pensis min jam forlasita plene
de ĉiuj karaj kaj amataj homoj,
kaj vivo ŝajnas perdi celon kaj valoron...

Nur sola vi dum tiuj tristaj horoj
helpadis min retrovi ekvilibron
animan kaj plenigi kor-vakuon
per viaj sonoj melodiaj, belsonoraj,
kaj per ideoj plej humanaj, kiuj
kunigas la bonvolajn pac-amantojn
el ĉiuj anguletoj de l´ planedo
en unu grandan rondon familian.

Ho, kara nobla lingvo Esperanto,
mirakla ilo por interkompreno!
ĝis lasta spiro kun fervoro
mi gloros, benos vin
el tuta mia koro...




*Nadija Andrianova (1921-1999)*
*Esperantistiĝis en 1965*
*Ukrajnino kaj Sovetianino Profesia ukrajna verkistino.*

# IOM PRI ASTRONOMIO




Kiam ni parolas pri “astronomiaj distancoj”, ni scias, ke ili estas treege grandaj, tiom grandaj, ke ni malfacile imagas. Por havi pli precizan ideon, ekzistas bona rimedo: reduktita modelo laŭ niaj kutimaj mezuroj. Do ni provu.



Supozu. ke la suno estas globo 15 cmojn larĝa, do kiel dika oranĝo, infanpilko, meloneto. (Tio estas skalo 1/10.ooo.ooo.ooo.ooo sed forgesu tion). La diametro de la Tero estas centono de la meloneto do 0,15 cm = 1,5 mm. Sablero ! kaj ĝi troviĝas je la distanco de 18 m de la suno. Momente imagu tion, kiom da lumo, varmo, da energio foriras al la spaco. Ni ricevas treege malgrandan parton de ĝi. Tamen la sunlumo blindigas nin kaj ni sentas nin etaj, etaj, mikroboj.


Kaj la aliaj planedoj ? Merkuro je 7 m, Venuso je 13 m, Marso 27 m, Jupitero 90 m, Saturno 170 m, Urano 350 m, Neptuno 540 m, Plútono 710 m, kaj la plej proksima stelo je 4.200 km. Ni ne parolu pri la aliaj steloj.

Ĉu nun vi havas, pli precizan ideon pri la vakuo de la spaco?. Amuziĝu kaj imagu la sunon 10 foje pli dikan 150 cm = 1,50 m kaj kalkulu la aliajn nombrojn. Ne estas malfacile: sufiĉas multobligi per 10. Vi ankaŭ povas imagi. Sed se vi multobligas per 100, 1000... la modelo fariĝas pli kaj pli malpreciza. Se temas pri la realaj distancoj, tio fariĝas “ĉina lingvo”




Kunlaborantino: SUZANNE AUTHIER
FRANCIO

# LA INFANO DE LA ĈASISTO



La infano de ĉasisto iris arbaren ĉiutage, malantaŭ sia patro, kun tornistro kaj pano. Nokte ili revenis, kun zonoj da palumboj kaj leporoj, kun la kruroj makulitaj de ruĝaj gutetoj kiuj, iom post iom, nigriĝis. La infano de la ĉasisto atendis en la eta kabano el branĉoj, aŭdis la pafojn kaj kalkulis ilin softe. En la nokto, stumblante ĉe la ŝtonoj, li sentis kiel la bekoj de la palumboj, de la perdrikoj, de la koturnoj kaj de la turdoj, martelis liajn genuojn. La infano de la ĉasisto sonĝis ĝis sunleviĝo pri ĉasoj kun fusiloj kaj hundoj. Plenlunan nokton, la infano de la ĉasisto ŝtelis la fusilon kaj forvojis supren ale al la arboj. La infano ĉasis ĉiujn stelojn de la nokto, la blankajn alaŭdojn, la lazurajn leporojn, la verdajn palumbojn, la orajn foliojn kaj la pikan venton. Li ĉasis la timon, la froston, la mallumon. Kiam oni portis lin hejmen, ĉe la aŭroro, la patrino vidis ke la frumatena roso, ruĝiĝinte kiel vino, makulis la blankajn genuojn de la stulta infano ĉasista.





El la libro: "La stultaj infanoj"


**Verkis:** Ana Maria Matute

**Esperantigis:** Liven Dek

# KATAJ TRAVIVAĴOJ

*Katidoj vojaĝis 1300 kilometrojn*

Unumonata katidaro vojaĝis 1300 kilometrojn for de sia patrino, sed tamen travivis la aventuron.



Missan estas la domkato de golfklubo en Malmö, Svedio, jam kvar jarojn. Ŝi alvenis kiel sovaĝkatino tamen amikiĝis kun la golfludantoj. Komence de oktobro ŝi naskis 8 idojn. "Kiam ili estis ankoraŭ tri tagojn aĝaj ŝi kaŝis ilin ien", rakontas Torsten Kvist. De tiam neniu vidis ilin plu, malgraŭ la serĉado. Missan ne volis montri la sekretan idejon.

Ĉe la golfejo estis parkita fosmaŝino luata de familio el Umeå, norda Svedio. Kiam la maŝino forveturis, la katino forte eknervoziĝis. Ŝi vagis tien kaj reen ade miaŭ-ante. Tiam la golfistoj komprenis, kien ŝi estis kaŝinta ŝiajn idojn.

Kiam la maŝino alvenis al Umeå kelkajn tagojn poste, la luantoj trovis la malfortajn katidojn. Ili telefonis al la golfklubo kaj demandis, ĉu ili deziras rericevi la katidojn. La klubanoj ĝojis, ke la katidoj vivas sed tamen proponis, ke ili restu en Umeå: Intertempe la hundino de la familio en Umeå estis ekfunkciinta kiel rezervo patrino por la idoj kaj fakte sukcese flegis ilin.

La nova familio volonte akceptas la respondecon pri la idoj kaj estonte la nordsvedaj katoj ricevos ankaŭ sudsvedan sangon.

*(Folioj de Kat-amikaro)*

INGRID NÄSHOLM
SVEDIO




-Manjo, metu viajn ŝuojn antaŭ la pordon - diris la patro – ĉi-nokte alvenos Avo Frosto kaj lasos en ilin donacojn...
- Ĉu ne estus pli bone, paĉjo, se ni metus viajn ŝuojn?, ĉar ili estas pli grandaj...

Viro eniras registrejan ĉambron ekkriante:
-Sinjoroj, mi volas registrigi miajn dunaskitojn!
-"Bone diris la oficisto, sed kial vi adresas min "sinjoroj"?. Mi estas ja la sola viro en la ĉambro.
- Dio mia, balbutis la juna patro "pli bone, mi iru hejmen kaj ĵetu alian rigardon al tiuj dunaskitoj..."
Patricia Harkin - Australio

- Per kiu mano vi enmetas sukeron en vian teon?
- Per la dekstra. Kaj vi?
- Mi uzas kulereton, estas pli civilizite, ĉu ne?

- Nur foje en la vivo okazas 18-jariĝo.
- Kaj 81-jariĝo okazas eĉ malpli

-Kial fiŝoj ne parolas?
-Nu, ĉu vi mem povus paroli sub akvo?

Viro ekividis belulinon kaj li diris:
- Kiel belega vi estas! kaj ŝi respondis:
- Dankon! Sed bedaŭrinde mi ne povas diri la samon al vi...
- Nu, faru kiel mi, ne diru la veron!!!

MALFACILA PROBLEMO
-Morgaŭ okazos bankedo kaj mi pripensas ĉu iri ĉu ne?
-Kiu pagos la bankedon?
-Mi

**PETAĴO**
Mi petas humoraĵojn el diversaj landoj por publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
Sendu al:
**CISIMO R. SIMON**
**C/ La Magdalena nº 26 – 1º D**

# PENSOJ

La ekzistado de lingvo internacia, per kiu povus kompreniĝadi inter si la homoj de ĉiuj landoj kaj popoloj, alportus al la homaro grandegan utilon.

Kio estas la esenco de la esperantisma ideo kaj al kia estonteco alkondukos iam la homaron la interkompreniĝado sur neŭtrale-homa, sengenta lingva fundamento-tion ni iuj sentas tre bone, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo kaj grado.

Vivu Esperanto sed antaŭ ĉio vivu la celo kaj la interna ideo de la esperantismo, vivu la frateco de la popoloj, vivu ĉio, kio rompas la murojn inter la gentoj, vivu kresku kaj floru la verda standardo.

Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartenaĵojn.

Pli aŭ malpli frue lingvo internacia nepre estos enkundikita.

Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj.

**L. L. Zamenhof**